Oni observas daŭran malrapidan malkreskon de pluraj jaroj kun 155 membroj ĉi jare kun malmulte da novaj membroj, montrante ke plej multaj membroj estas « kernaj membroj » de la lokaj asocioj.

Agoj de la federacio

Eldono de la federacia bulteno *Verda Triskelo* (20-paĝa, 2 foje jare aŭtune kaj printempe), kun artikoloj proponitaj de la membroj de la diversaj lokaj kluboj, redaktoro: Jannick Huet.

Retejo: <http://bretonio.esperanto-france.org/>

administrantoj: Bert Schumann kaj Xavier Godivier.

Reta diskutlisto de la membroj: bretonio@yahoogroupes.fr kun 280 abonantoj, ĉirkaŭ 200 mesaĝoj ene de 2018, administrata de kvar volontuloj.

Organizo de prelegturneoj

Du ĉefaj turneoj okazis dum 2018 en Bretonio.

- Unua estis organizita de Josette Ducloyer por la FEB : Nijole Stakeniene, de Litovio, rondvojaĝis de la 3a de aprilo ĝis la 27a de aprilo en Montfort, Rennes, Pleugueneuc, St Malo, St Briec, Lannion, Douarnenez, Hennebont, Vannes, Sarzeau, Nantes, St Aignan, Grésillon, kun granda sukceso. Ŝi parolis pri Litovio kaj rilatoj kun Eŭropa Unio.
- Dua prelegturneo estis organizita dum majo de Yves Nicolas por Esperanto-France : Normand kaj Zdravka de Kebekio estis en Nantes, Douarnenez, Plouezec, St-Malo kaj Rennes. Zdravka prelegis pri sia propra sperto kiel enmigrinto kaj Normand prezentis profesian analizon pri la rilato de la homaro kun la arbaroj.

Okazis ankaŭ vizito de Dennis Keefe en Vannes.

Rilatoj kun Esperanto-France: Josette Ducloyer reprezentas la FEB-on ĉe UFE, tri aliaj membroj de la federacio estas ankaŭ UFE-komitatanaj, du kiel reprezentantoj de membroj de UFE, kaj unu kiel reprezentanto de GEE.

Jara kunveno en Loudéac la 25an de marto 2018

43 ĉeestantoj, veno de ĵurnalisto de *Télégramme de Brest*.

Matena programo : Post la laŭstatutaj devoj de la kunveno, pluraj intervenoj estas proponitaj pri *Kiel interesi novajn homojn al Esperanto* kun diversaj spertoj : funkciado de nova grupo en Pluvigner, fino de la kursoj en Ensac de Lanion, daŭrigo de la kurso en Université de Lorient, kurso en mezlernejo de Guingamp kaj sperto pri Tap (temps d'activités péri-scolaires) en Sarzeau. Debato kaj teatrema ludo por ekzerci pri Esperanto-informado al scivolemaj aŭ kritikemaj personoj.

Posttagmeza programo : Kantoj de la koruso Interkant kaj teatraĵo prezentita de membroj de Esperanto-Vannes, kun la komedio *Amo ĉe la pordo*.

Agoj de la lokaj asocioj membroj de la federacio

Kursoj de Esperanto : Kursoj kaj konversaciaj rondoj estas proponitaj en 15 urboj kaj vilaĝoj de nia regiono. Detaloj pri ĉiuj kursoj estas ĉiu-jare disdonitaj en la aŭtuna revuo de la federacio, Verda triskelo, VT45 por ĉi-jare, konsultebla en la tt-ejo de la FEB.

Pli detala raporto pri la lokaj asocioj estos prezentita okaze de la venonta membrokunveno de la federacio en marto kaj konsultebla en la TTT-ejo de la federacio.

Raportas Xavier Godivier

5.4. Burgonjo-Franĉkonteo

Ne plu estas kursoj malgraŭ pluraj provoj, tamen aktivuloj agadas en la liceo en Salins-les-Bains.

Dole-Esperanto

Dole-esperanto organizis du esperanto-sabatoj, en kiuj partoprenis ĉiufoje ĉirkaŭ 30 esperantistoj el Ĵuraso kaj de la najbaraj departementoj.

Raportas Emmanuel Desbrières

5.5. Fédération Espéranto-Centre-Ouest (Centrokcidento)

Ne ekzistas vigla federacia asocio.

Ni proponas al vi ankaŭ legi la raporton pri la Kultura Esperanto-Centro Grésillon (vd. paragrafo 2.1.1).

5.6. Fédération Espéranto-Languedoc-Roussillon (Langvedoko-Rusiljono)

La federacio ne organizis kunvenon en 2018.

La grupo de Montpellier helpas por la rekomenco de SFS.

Raportas Martine Ragonnet

5.7. Fédération Espéranto-Limousin

- À Brive
 - Cours hebdomadaire au centre culturel
 - Cours au lycée d'Arsonval à partir de janvier avec 4 élèves, dont 2 ont continué jusqu'au bac
 - Animation mensuelle d'un café des langues jusqu'en mai
- À Saint-Junien
 - 24 et 25 mars : stage d'espéranto à Saint-Junien sur le thème de la Nature avec 33 participants et les visiteurs grâce aux portes-ouvertes avec un cours d'initiation animé par I. Jacob, un cours de perfectionnement animé par C. Doucelin et un cours de conversation animé par M. Redoulez et visite de la rue Zamenhof
 - Septembre : démarrage des cours avec 13 élèves et deux profs : C. Doucelin et I. Jacob
- Juin : tournée de Georgi Milhalkov dit Modesto, espérantiste bulgare qui nous a parlé de son pays, à Brive le 16 juin et à Limoges le 18.
- 15 décembre : « Saint-Zaza » à Limoges, avec près de 20 personnes, chez les Brunel avec peinture d'une banderole pour Espéranto-Limousin

Participation de quelques membres :

- Aux traductions du *Courrier de l'UNESCO*, à *Poésie en liberté*, au congrès de Servas aux Vaseix avec présentation de l'espéranto, au trilandaj kongreso avec Espéranto-France à Zweisbrücken, au congrès d'ILEI à Madrid, au congrès d'UEA à Lisbonne, au congrès de SAT en Serbie.
- Déplacement du siège social du Foyer de culture internationale / *Hejmo de Internacia Kulturo*, du département de la Haute-Vienne (Limoges, où reste le siège de la fédération Espéranto-Limousin) à celui de la Creuse (Saint-Pierre-Chérignat) : au domicile du nouveau trésorier du FCI, élu cette même année 2018
- Parution de deux contributions dans un *Fest-libro* pour les 75 ans de l'historien allemand de l'espéranto Ulrich Lins, qui lui a été présenté fin juillet à l'occasion du Congrès universel d'espéranto à Lisbonne
- et juste en fin d'année, un article de 20 pages dans une revue universitaire : *Lazar Zamenhof (1859-1917) : Du sionisme au hillélisme et de l'hébreu à l'espéranto*, in *Tsafon : Revue d'études juives du Nord*, n° 76, automne 2018- hiver 2019, p. 123-142.

Raportas Pierre Bouvier kaj Gilles Tabard

5.8. Fédération Espéranto-Nord (Nordfrancia Esperanto-Federacio)

Regiona kunordigado

Membraro

La Federacio nombras entute 96 membrojn (kp. kun 99 membroj en 2017):

- el la kluboj de: Amieno: 22 ; Araso: 18 ; Bulonjo-ĉe-Maró: mankas informo ; Lillo: 32 ; Valencieno: 12
- el la individuoj-membroj: 12

Federaciaj kunsidoj, kongresoj:

La Federacia Komitato kunsidis dufoje en 2018: la 16an de junio kaj la 15an de decembro, ambaŭfoje en Lillo. Ankaŭ okazis federacia ĝenerala asembleo la 16an de decembro. Grava decido estas la ŝanĝo de nomo de la federacio: ĝi nun nomiĝas Fédération Espéranto Hauts-de-France (anstataŭ Fédération Espéranto-Nord). La federacio decidis aliĝi al la interasocia kotizsistemo.

Rilatoj kun UFE

Prezidanto Michel Dechy reprezentas la Nordfrancian Federacion en la komitato de UFE.

Informado kaj komunikado

Federacia gazeto, federacia retejo

La Federacio eldonis retan informbultenon *Norda Kuriero*. Ĝi estis sendita papere al federacianoj, kiuj ne uzas Interreton. Ĝi aperis trifoje en 2018: en marto, julio kaj novembro.

La dulingva federacia retejo viziteblas je la adreso: www.esperanto-nord.org

Informado en diversaj medioj

Michel Dechy prezentis Esperanton al la 5 klasoj de la nivelo "premières" de la liceo La Salle en Lille kaj al 2 klasoj "terminales S" en la liceo de Gondecourt. Li ankaŭ prezentis Esperanton dufoje al la sama klaso "CM2" de bazlernejo Anatole France en Villeneuve d'Ascq.

La diversaj kluboj partoprenis en diversaj foiroj kaj aranĝoj: asocia foiro (Villeneuve-d'Ascq kaj Lillo), bildrakonta foiro (Lys-lez-Lannoy).

La Lilla klubo starigis Esperanto-budon en la granda Lilla stratbazaro.

Instruado kaj ekzamenoj

Kursoj kaj staĝoj

Diversajn kursojn organizis la kluboj (lernjaro 2017-2018):

- Amieno: paroliga kurso kun 5 partoprenantoj ;
- Araso: kurso por pluraj gradoj ;
- Bersée: 2 komencanto kaj 9 progresantoj ;
- Bulonjo-ĉe-Maró: babilrondo ĉiumerkrede ;
- Lillo: 2 komencantoj kaj 4 progresantoj en MRES (Maison régionale de l'environnement et des solidarités); 3 lernantoj en la Lilla Universitato (Villeneuve-d'Ascq); 1 komencanto en la Universitato pri Libera Tempo.

Federaciaj ekzamensesioj

La Federacio ne organizis ekzamensesion.

Kulturo kaj aranĝoj

- En la urbo Salouël, apud Amieno, estis inaŭgurita nova Zeo: *Allée de l'Espéranto* (Aleo Esperanto). Ĉeestis urbestro, oficialuloj, kaj dudeko da esperantistoj.
- La Amiena klubo instalas la ekspozicion *Esperanto dum la unua mondmilito* en la urbodomo.
- La klubo Arras-Espéranto festis sian 25an jariĝon per lingvo-festivalo. Estis prezentataj 25 lingvoj, kaj la tago finiĝis per koncerto de Jomo.
- La Federacio akceptis plurajn **eksterlandajn prelegantojn**, kiuj vizitis unu aŭ plurajn klubojn: Dennis Keefe (Usono), Helmut Klünder (Germanio).
- Pluraj amienanoj partoprenas la ludon Esperanto-Sumoo organizatan de Hori Jasuo, kiu instigas legi librojn en Esperanto.. Ili ankaŭ partoprenas EoPK.
- Pluraj federacioj partoprenis en **internaciaj renkontiĝoj**: *Printempa Semajno Internacia* en Germanio, la Tago de la Ebena Lando laŭ invito de Piet Glorieux el la Kortrejka klubo (Belgio) kaj Novjara Renkontiĝo (Germanio). Amienanoj partoprenis triope la MONA kongreson en Maroko kaj ili kvarope partoprenis la UK-on.
- Jen Claude Roy el la Amiena klubo tradukis libron de Eric Vuillard (*Tagordo*) kun helpo de klubanoj. Ili komencis traduki *Le papillon et la lumière* de Patrick Chamoiseau.
- La Lilla klubo organizis sian Zamenhof-feston en la 15a de decembro en MRES (asociara domo): en ĝoja etoso la partoprenantoj ludis, interalie per malnovaj regionaj ludoj, aŭskultante muzikon kaj babilante meze de glasoj kaj kukoj.

Raportas Katja Boen

5.9. Fédération Espéranto-Normandie (Normandio)

Aliĝis pli 70 homoj al la normanda asocio (kiel de pluraj jaroj). Okazis regulaj kursoj en Hérouville-Saint-Clair (Caen. Pluraj gvidantoj), en Granville/Avranches (Christian Levesque), Flers (Anne-Marie Leprévost) kaj iom en Le Havre.

La asocio :

- Organizis eldonon de 3 numeroj de sia regiona bulteno (12-paĝa) ;
- Deponis ĝiajn malnovajn numerojn ĉe la Nacia Biblioteko kaj la normanda fonduso de la Mediateko de Caen ;
- Akceptis la kantgrupon La Kompanoj por du tre sukcesaj koncertoj en Hérouville kaj en Avranches (dank'al tiu koncerto kaj prelego de Duncan Charters en 2017, malfermiĝis kurso por 14 lernantoj el la Inter Aĝa Universitato de Normandio ekde oktobro) ;
- Kongresis en L'Aigle (Orne) en majo kun 35 partoprenantoj kaj prelegoj de Zdravka Metz kaj Normand Fleury

Prezidanto : Y. NICOLAS (Caen)

Kasisto : Sylvie Caron (Le Havre)

Sekretario : Anne-Marie Leprévost (Flers)

Raportis Yves Nicolas

5.10. Fédération Espéranto-France-Est (Orientfrancio)

La tradicia *Printempa staĝo* okazis de la 20-a ĝis la 22-a de aprilo 2018 en la ferio-centro RIMLISHOF, apud Buhl/Guebwiller, kunlabore kun niaj germanaj geamikoj de BAVELO (Badenvirtemberga Esperanto-Ligo). Prelegis Spomenka Štimec, kantis Anjo Amika.

Partopreno en kongresoj

Pluraj gesamideanoj partoprenis en kongresoj (UEA: Lisbono – ILEI: Madrido – Itala Kongreso: San Marino – Trilanda kongreso en Zweibrücken kaj la tradicia aŭtuna kongreso organizita de BAVELO en Heidelberg (Germanio).

La Frajburga Esperantogrupo invitis al alia tradicia aranĝo en Frajburgo.

Budoj

Tradicie denove okazis deĵorado en budoj por prezento de la agado de Esperanto France-Est kaj de la loko grupo Mulhouse-Espéranto en MULHOUSE (ALTERNATIBA), UNGERSHEIM (Ekologia foiro), Librofestoj en WESSERLING, Vilaĝo de la libroj (Fontenoy-la-Joute).

Trilanda ZAMENHOFFESTO en Frajburgo

Denove la Zamenhoffesto estis trilanda : germana, svisa kaj franca, organizita de nia germana kunlaboranta asocio BAVELO. La trideko da geramideanoj vizitis arkeologian muzeon, kune tagmanĝis en afgana restoracio kaj kafumis kaj kukojn frandis en la frajburga kunvenejo, aŭskultante prelegojn de Manfred Westermayer, Aloïs Eder kaj Edmond LUDWIG.

Retejoj

- Daŭre André GROSSMANN aperigas ĉiutrimestre (rete kaj papere) la riĉe ilustritan koloran bultenon **LA INFORMILO** kun interesaj vojaĝimpresoj de niaj samideanoj.
- Daŭre niaj samideanoj provizas la revuon per siaj vojaĝimpresoj kaj pri estontaj aranĝoj.
- Jean-Luc THIBIAS daŭre okupiĝas sukcese pri la **LIBROSERVO**.
- André GROSSMANN daŭre prizorgas la **retejon de EFE**:

Dank' al Jacques HERLÉ, kiu skanis malnovajn ekzemplerojn de *LA INFORMILO*, eblis kompletigi la historion de Esperanto France-Est, kiun eblas malkovri sur nia retejo:

<http://esperanto.france.est.free.fr/historio.htm>

Espéranto France-Est suferis imensan perdon pro la sinsekva forpaso de tri agademaj gesamideanoj: Robert COLIN, Simone KIRY kaj Ginette MARTIN.

Raportas Edmond Ludwig

5.11. Fédération Espéranto-Paris-Île-de-France (Parizo-Francilio)

Administro

Membraro

	2017	2018
Membroj de la Federacio	120	161

En 2018 nia membraro pligrandiĝis po 34%

Jarkunveno

La jarkunveno 2018 okazis la 22an de Aprilo en nia sidejo. La agadan kaj finanĉan raportoĵn aprobis la partoprenantoĵ.

Jen la nova komitato: Michèle Abada-Simon - Didier Janot - Sylviane Lafargue - Didier Loison - Jean-Lucien Mazeau - Daniel Micheneau - Abdel Nouri - Laure Patas d'Illiers - Marianne Pierquin - Armelle Piolat

Ĉiuj mandatoĵ finiĝos en la Jarkunveno 2019.

Post la kunveno, la komitato elektis la novan estraron :

Prezidanto Marianne Pierquin
 Vic-prezidanto Laure Patas d'Illiers
 Kasisto Didier Loison
 Sekretario Jean-Lucien Mazeau
 Vic-sekretario Armelle Piolat

Komitataĵ Kunvenoj

Ili okazas trimestre en la sidejo en februaro/marto (antaŭ la Jarkunveno), junio, septembro kaj decembro. Kaj unu plia okazas tuj post la Jarkunveno, por ke la komitato elektu la novan estraron. En 2018 la Komitato fizike kunvenis 5 fojoĵn: marte, maje tuj post la Jarkunveno, junio, septembre kaj decembre.

Rilatoĵ kun Esperanto-France

Marianne Pierquin estas nia delegito ĉe la komitato de Esperanto-France (EF).

Diversaj bonvolemuĵoj de nia federacio helpas ĉe la Cerisaie pri diversaj taskoĵ.

Pluraj franciliaĵ esperantistoĵ estas membroĵ de la komitato de EF kaj partoprenas en la vivo de tiu landa Asocio.

Komunikado

La komunikado de la Federacio Esperanto Parizo-Francilio disvolviĝas grandparte per la retlisto Francilio kaj la reteĵoj :

<https://esperanto.paris>

<http://facebook.com/esperanto.paris>

http://twitter.com/esperanto_paris

Telegramo : grupo Esperanto en Francilio (60 membroĵ)

Amikumu

La komitato komunikas inter si per specifa retlisto.

Agadoĵ

Budoĵ, prelegoĵ, festoĵ, ktp

Januaro	13	Reĝkuko	Sidejo
Marto	28	Rencontre-débat : L'espéranto dans le monde du libre à l'occasion de l'évènement Libre en fête	Sidejo

Aprilo	22	Jarkunveno	Sidejo Institut du Monde Arabe
Majo	24-27	Budo Salon Culture et jeux mathématiques	6a kvartalo
	26	Conférence-débat : Les langues et l'Union Européenne	Sidejo
	28	Prelego de Gergi Mihalkov (Julian Modest) el Bulgario : Kultura vivo en nuna Bulgario	Sidejo
Junio	9	Conférence-débat : Les langues et l'Union Européenne	Sidejo
	14	Neformala kunveno kun Trezoro Huang el Ĉinio	Sidejo
	22	Prelego de Gergi Mihalkov (Julian Modest) el Bulgario : La originala Eo-literaturo	Sidejo de Sat-Amikaro
Julio	26	Esperanto-tago : pikniko place des Vosges	4a kvartalo
Aŭgusto	8	Pikniko kun Vida el Litovio	Ponto Simone de Beauvoir
	22	Renkontiĝo kun Adjevi Adjé el Togolando	Sidejo
Septembro	8	Budo forum des associations	3a kvartal
	15 - 16	Budo en Asnières	92
	14 - 16	Budo en la Homara Festo	La Courneuve (93)
	22	Malferma tago de la sidejo	Sidejo
	26	Journée européenne des langues : Quelle(s) langue(s) pour l'Europe ?	Sidejo
Novembro	26	Prelego de Dennis Keefe	Sidejo
Decembro	15	Zamfesto de la fervojistoj kun financa kontribuo de la federacio	

Instruado

Kursoj

	2017 / 2018	2018 / 2019
Partoprenantoj en la unuanivelaj kursoj - 1 kurso de Michèle Abada-Simon - 1 kurso de Didier Jano	4	7

Partoprenantoj en la duanivelaj kursoj - 1 kurso de Michèle Abada-Simon - 1 kurso de Didier Janot	7	9
Partoprenantoj en la trianivela kurso - 1 kurso de François Lo Jacomo	3	6

Partoprenantoj Esperanto Aŭtodidakte - 1 kurso de Didier Jano	3	–
---	---	---

Staĝoj por komencantoj en junio kaj septembro Michèle Abada-Simon		22
---	--	----

Ekde oktobro kaj laŭ la peto de kelkaj lernantoj, malfermiĝis nova supera kurso gvidata de François Lo Jacomo.

En 2018/2019 la kursoj kostas po 100 aŭ 60 eŭroj jare + aliĝo al Eo-France

Ekzamenoj

Trejnsezio 2017 por la KER ekzamenoj (B1-B2-C1) gvidata de Didier Janot

	Kandidatiĝis	Sukcesis
B1 nivelo	2	0
B2 nivelo	1	1
C1 nivelo	3	3

Kulturaj parolrondoj

Kulturaj Parolrondoj, 2 lundojn monate, organizata de Marianne Pierquin, Régis Fournier kaj Laure Patas d'Illiers

15a de januaro	La giganta araneo : filmo (Régis Fournier - Marianne Pierquin)
5a de februaro	Belartaj konkursoj (Laure Patas d'Illiers et Jesper Jacobsen)
19a de februaro	Scenaro de filmo : projekto amseruroj (Régis Fournier)
5a de marto	Scenaro de filmo : projekto amseruroj (Régis Fournier)
19a de marto	Prelego de Sonia Amariglio pri siaj memoraĵoj
16a de aprilo	Scenaro de filmo : projekto amseruroj (Régis Fournier)
18a de junio	Inteligenteco de la arboj : filmo (Elisabeth Barbey)
1a de oktobro	Ateliero de verkado (Laure Patas d'Illiers)

15a de oktobro	Videaĵoj kaj debato (Laure Patas d'Illiers)
5a de novembro	Ateliero de literaturo (Anne Jausions)
19a de novembro	Cerbumludoj (Laure Patas d'Illiers)
3a de decembro	Ateliero de literaturo (Anne Jausions)
17a de decembro	La belulino kaj la besto : filmo de Jean Cocteau (Régis Fournier)

Esperanto-kafejoj

Ĉiumonata rendevuo en trinkejo por babilo esperante en diversaj parisaj kvartaloj

13a de januaro	Reĝkuko (sidejo)
10a de februaro	Ĉe “Marcel et Lili” (13a kvartalo)
10a de marto	Ĉe “Le Carreau” (3a kvartalo)
14a de aprilo	Ĉe “Le troisième café” (3 kvartalo)
12a de majo	Ĉe “L’esperantie” (1a kvartalo)
9a de junio	Pikniko Place des Vosges (4a kvartalo)
8a de septembro	Ĉe “Le court circuit” (20a kvartalo)
13a de oktobro	Ĉe “Café Gladines” (13a kvartalo)
10a de novembro	Ĉe “Café des phares” (4a kvartalo)

Raportas Marianne Pierquin

5.12. Fédération Espéranto-Provence (Provenco)

Membraro

Esperanto-Provence havis 86 membrojn je la 31a de decembro 2018.

40 pagis al UFE
 el ili : 10 pagis nur al UFE
 13 pagis la grupan kotizon (Marseille kaj Gap)
 6 pagis al UFE kaj la Federacio
 11 pagis al UFE kaj sia klubo
 21 pagis nur al la Federacio
 25 pagis nur al sia klubo

Asocioj, grupoj kaj individuaj membroj

2.1 deklaritaj asocioj

04 - Manosque - E.K.E.M. (Esperanta Kulturo en Manosque): 8 federaciaj membroj

05 - Gap - Espéranto-Gap : 6 federaciaj membroj

13 - La Roque-d'Anthéron : Espéranto-La Roque

13 - Marseille : 7 federaciaj membroj

ttt-ejo : <http://esperanto.marseille.over-blog.com>

13 – Miramas : G.E.M. (Groupe Espéranto Miramas)

83 – Saint-Raphaël : Espéranto-Club Saint-Raphaël : 18 federaciaj membroj

83 - Le Beausset - Espéranto – Le Beausset_ : 10 federaciaj membroj

84 – Avignon - K.E.C.A. (Kultura Esperanto-Centro de Avinjono)

2-2 antenaj grupoj de Espéranto-Provence

13 - La Ciotat ; 84 – Carpentras ; 84 - Orange

Administrato

Estraranoj (3) : prezidanto : Pierre Oliva

 sekretario : Pascal Vilain

 kasisto : Nicole Lafitte

Aliaj komitatanoj (6): Monique Arnaud, Marc Gallardo, Franz Mimmersheim (eksigita la 2an de decembro), Thierry Spanjaard, Renée Triolle, Gilles Wallez

Gazetrespondeculo : Pascal Vilain

Retejrespondeculo : Thierry Spanjaard, Pascal Vilain

Reprezentanto de nia federacio ĉe Espéranto-France : Pascal Vilain (anstataŭantino : Renée Triolle)

Membrokunveno

Ĝi okazis en Les Issambres (83) la 25an de februaro, okaze de la Mediteranea Esperanto-Semajno.

18 partoprenintoj + 21 senditaj rajtigiloj

Komitatkunsidoj

- januaro 28 : Marseille (ĉe Thierry Spanjaard)
- februaro 25 : Les Issambres (post la membrokunveno)
- junio 3 : La Ciotat (ĉe Renée Triolle)
- decembro 2 : Le Beausset (post la Kultura Semajnfino)

Instruado

Kursoj

- en la kluboj de Saint-Raphaël, Le Beausset, La Ciotat, Marseille, Avignon, Manosque
- en *Lycée de la Méditerranée* en la Ciotat : 12 lernantoj – instruas Renée Triolle
- en *Collège Le Petit Prince* en Gignac-la-Nerthe (13) – 20/25 lernantoj – instruas Eric Streichemberger

Staĝoj

- februaro 25 / marto 3 - Les Issambres (83) : Mediteranea Esperanto-Semajno
- decembro 1/2 - Le Beausset (83) : Kultura Semajnfino (kursoj gviditaj de Mari-Roza Vilain, Renée Triolle, Pascal Vilain)

Ekzamenoj

- junio 16 – Le Beausset : FEI-ekzamenoj ; tri kandidatinoj, ĉiuj sukcesis

Informado – komunikado

- Dum la tuta jaro, disdonado de *Le Monde de l'espéranto* (Renée Triolle en La Ciotat kaj Marseille, Rosy Inaudi en sia regiono, Pascal Vilain en Dracénie)
- Dum la tuta jaro, en Marseille (Equitable Café), la 1an jaŭdon de ĉiu monato : *Lingva kafejo*
- Februaro 21 – Gap – Supera hotellernejo : Monique Arnaud prezentis nian lingvon al 30 lernantoj
- Februaro 22/23 - Saint-Bonnet-en-Champsaur – Collège de Saint Bonnet : Monique Arnaud prezentis nian lingvon al du klasoj (6a kaj 5a)
- Marto 13/16 : sama laboro en la sama loko
- Aprilo 12 – Gap – Supera hotellernejo : Monique Arnaud ree prezentis nian lingvon
- E.K.E.M. (Manosque) : deĵorado en la Domo de la Asocioj la unuan kaj trian sabatojn, ĉiumonate dum la tuta tago ekde la 9a45.
- Septembro 2 - Fréjus : *Forumo de la asocioj*
- Septembro 8 – Manosque, La Ciotat, Le Beausset : *Forumo de la asocioj*
- Septembro 9 – Marseille : *Vivacité - Forumo de la asocioj*

Klubaj eventoj

- Januaro 17 - La Ciotat : membro-kunveno + reĝkuka festeto
- Januaro – Manosque : ĝenerala kunsido
- Februaro 4 - Saint-Raphaël : reĝkuka festo + membro-kunveno
- Februaro 6 - Marsejlo : enmanigo de la FEI-diplomoj al 3 sukcesintoj en la duagrada ekzameno.
- Junio - Avignon : kultura tago kaj pikniko
- Junio 5 (Marseille) kaj 6 (La Ciotat) : prelegturneo de Julian Modest (Georgi Mihalkov) el Bulgario
- Junio 24 - Saint-Raphaël : komuna manĝado kaj distra posttagmezo en Les Issambres
- Septembro 2 – Fréjus (Base Nature): pikniko de la klubo de Saint-Raphaël
- Decembro 6 – Avignon: 40-a Zamenhof-tago kun prelego de Thierry Spanjaard pri *Metromapoj, eksplora universo*, sekvata de distra programo.

Movadaj eventoj

- Februaro 24 / mars 3 – La Bastide-sur-l'Hers (09) : staĝo pri ĥora kantado
- Aprilo 12-13 – Tehrano (Irano) : 5a Irana Esperanto-Kongreso – partoprenis Thierry Spanjaard
- Aprilo 20-28 : Greziljono (Baugé) : staĝo *PRINTEMPaS* – partoprenis Nicole Lafitte kaj Pierre Oliva
- Majo 18-21 – Zweibrücken (Germanio) : Franca-Germana Kongreso. Partoprenis Renée Triolle
- Julio 28 – aŭgusto 4 : 103-a Universala Kongreso de UEA en Lisbono (Portugalia). Partoprenis dudeko da Provencaĵoj.

Kulturaj eventoj

- Februaro 21 – La Ciotat : *Internacia Tago de la Gepatra Lingvo* – budo de Esperanto-La Ciotat
- Mmarto 9 -11 – Saint-Etienne : Festivalo *Curieux Voyageurs* – Alain Rémy prezentis sian biciklan vojaĝon «Ukrainio-Rusio»
- Majo 5 – La Ciotat : *Eŭropa Festo* ; budo de Esperanto-La Ciotat
- Majo 19 – Marseille : *Forumo de Lingvoj* ; budo de Esperanto-Marseille ; prelegeto de Chantal Beaumont kaj Victor Grousset.
- Majo 26 - Embrun : *Eŭropa Festo* ; budo de Esperanto-Gap
- Decembro 17-19 – Parizo : Internacia NRO-Konferenco 2018 ĉe Unesco *Valoriser l'engagement et la contribution des ONG partenaires de l'Unesco* ; partoprenis Renée Triolle por UEA kaj Monique Arnaud por ILEI.

Diversaĵoj

- Forpasis Christiane Puydebois (klubo Saint-Raphaël) kaj Francis Briuelle (klubo Avignon)
- Thierry Spanjaard zorgis pri nova retejo de INOE (Internacia Naturista Organizo Esperantista)
- Aperis en Eo-revuoj artikoloj de federacioj : en *Monato* (Marc Gallardo), en *Literatura Foiro* (Renée Triolle)...
- Julie : du Ĉininoj gastis ĉe Thierry Spanjaard
- Aŭguste : Brazila paro gastis ĉe Renée Triolle ; ili estis akceptitaj ĉe la turismoficejo en Le Beausset, kaj vizitis La Cadière d'Azur sub ĉiceronado de loka komencantino.
- Aŭguste : Mari-Roza kaj Pascal Vilain renkontiĝis kun Lu Wunsch-Rolshoven, prezidanto de EsperantoLand, en La Croix-Valmer
- Oktobro 2 : vizito de du Rusoj el Ekaterinbourg, kiuj partoprenis en la kurso de la loka klubo
- Oktobre : Britino estis akceptita en Nico de Nicole kaj Gilles Wallez
- Alain Rémy biciklis dum la printempo kaj somero tra Eŭropaj landoj kaj iris bicikle al la Lisbona UK.

Venontaj okazaĵoj

- Marto 2-9 – Les Issambres : Mediteranea Esperanto-Semajno
- Novembro aŭ decembro 2019 - Kultura Semajnfino en Le Beausset (se plu eblos) : datoj, kursoj kaj distra programo decidotaj

Raportas Pascal Vilain

5.13. Fédération Espéranto-Poitou-Charentes (Puatuo-Ĉarentoj)

La federacio estas dormanta.

Tamen gravajn eventojn okazigas en Puatuo-Ĉarentoj la kulturcentro pri esperanto Kvinpetalo en Bouresse (86) (vd. ĉisupre la paragrafon 2.1.2 Kvinpetalo).

5.14. Fédération Espéranto-Rhône-Alpes (Rodanalpoj)

Dum la jaro la federacio organizis tri kulturajn kunvenojn kun dudek ĝis tridek-kvin partoprenantoj.

Ili estis sufiĉe sukcesaj en la senco ke la partoprenantoj esprimis sian kontentecon kaj pri la enhavo kaj pri la bona etoso. Tamen la plejmulto esprimis la deziron ke tiajn renkontiĝojn ni organizu nur po du fojoj jare, kun

sufiĉe da antaŭplano por maksimumigi la nombrojn de partoprenantoj.

Aliflanke, ĉiu klubo en la federacio funkcias laŭ sia propra ritmo kaj prioritatoj kaj post kvar eksiĝoj de la estraro en la jaroj 2016 kaj 2017, nur restas prezidanto kaj kasisto, ambaŭ de la Liona klubo. Skize dirite, la kluboj ne havas fortan emon labori federacie, ĉu pro ne sufiĉa aktiveco, ĉu male pro tro da loka aktiveco. Ekzemple, en Liono ni havas kursojn en tri diversaj lokoj, plus ĉiu-monata kafeja renkontiĝo, plus la renkontiĝoj okaze de rondvojaĝoj de eksterlandaj Esperantistoj, ktp.

Krom tio ni devas respondi al multaj por-okazaj demandoj. Bourg-en-Bresse havas plurajn regulajn kontaktojn eksterlande, kaj pluse ili kunlaboras kun siaj nordaj najbaroj de Jura. La Ŝamberianoj vojaĝas de tempo al tempo al Torino, ktp.

Ŝajnas al la du restantaj federaciaj estraranoj ke indas ke la federacio transformiĝu en inter-kluban strukturon, sen propraj financoj, kun ne formala kunordiga komitato kie sidiĝos reprezentantoj de ĉiu klubo; tiuj reprezentantoj povos ŝanĝiĝi iam ajn laŭ la individuaj bezonoj.

La du ĉefaj taskoj de la nova pli malpeza interkluba strukturo estos plani po du altkvalitaj kulturaj renkontiĝoj jare kaj helpi ĉiun klubon fortigi sian publikan ĉe-eston, precipe per la reto. Aldone, ni volas kontribui pli al Esperanto-France kies helpo gravas, aparte sed ne nur per i-kurso.

Ni planas la kunvenon por efektivigi tiujn ŝanĝojn je la dek-oka de majo.

Raportas Michael Leibman

5.15. Fédération Espéranto-Midi-Pyrénées (Sudo-Pireneoj)

Regiona kunordigado

La membraro kreskis de 86 ĝis 95 (15 el CEEA, 56 el EKC, 12 de Esperanto-Tarn, plus 6 individuaj membroj de UFE). Deko da membroj estas en pluraj listoj aŭ ne loĝantoj de la regiono.

La asocio ne estis reprezentata dum la 3 **ufe-komitatkunvenoj** de 2017-2018.

Estis **3 kunsidoj en Arrout** antaŭ aŭ post la staĝoj por ĉefe interŝanĝi informojn.

Nia jarkunsido okazis la 17/12/2017 en Foix, okaze de la Esperanto-festo. Partoprenis 10 personoj, el 5 departementoj.

En la komitato membras Françoise Eriksen (31), Véronique Bichon (09), Alain Casiez (09), Jorgos Comte (09), Gilbert Darrieux (65), Marc Roger (31), Marion Quenut (31), Bernard Legeay (12), Michel Metzger (81), Christophe Chazarein (31) et Francis Bidault (81).

Marion sendis la konvokilojn kaj redaktis kaj kolektis la raportojn.

Informado kaj komunikado

Niaj retaj paĝoj kuŝas en la **portalo** <http://Esperanto-midipyrenees.org>

La unua fazo de la projekto pri nova portalo de la regiono Okcitanio PM okazis en Septembro 2018. Marion kaj Florian el Montpellier laboris kaj rete renkontiĝis 3-foje pri la projekto. La portalo ekde tiam gastigas ankaŭ paĝojn pri Langvedoko-Rusijono. Estas paĝo pri la federacio (ĝisdatigota), paĝoj laŭ asocio, kaj aparta retejo nun por Esperanto-Kultur-Centro de Tuluzo. Restas iom da laboro. La nomo de la retejo baldaŭ ŝanĝiĝos. Eblas krei kiel por Tuluzo apartajn retejon. En la blogo Cirkulero, publikiĝis 5 artikoloj en 2017-2018. La portalo kostas ĉirkaŭ 20 € jare por la federacio, 40 € entute (jam pagita ĝis 2020. La federacio Langvedoko-Rusijono repagos en 2019 kaj 2020, duonon de la jara kosto.

Nia asocio havas **informbultenon** kiu aperis nur unufoje (Januaro) : *la Cirkulero de MidiPyrénées*, sendita papere al ĉiuj membroj, kune kun la Krokodil' de EKC ; pasintjare, nia asocio pagis por la sendado kaj la printado. EKC zorgis pri la sendado. En ĝi ankaŭ kuŝis diversaj aliĝiloj.

La asocio Esperanto Tarn partoprenis kiel kutime la organikan foiron Biocybèle. Pri EKC, legu la apartan raporton. Ne estis aparta ago de nia federacio por **konigi Esperanton en la regiono** (en la departementoj sen asocioj, kiel antaŭ pluraj jaroj en Montalbano kaj Kadurko). Ĉi-jare, denove ne estis stando en Bio Synérgie, en Montalbano, pro manko da homfortoj kvankam estas esperantistoj surloke.

Instruado kaj ekzamenoj

Kursoj pli malpli regule okazas iniciate de lokaj asocioj. Tri semajnfinaĵoj okazis en Arrout (Arieĝo), organizitaj de EKC (inter 15 kaj 23 partoprenintoj).

En Tarno, estas kurso kun 8 personoj en Graulhet. En Tuluzo, vidu la apartajn raportojn de EKC pri kursoj kaj Ekzameno.

En Tarn et Garonne, esperantisto kadre de *Les Francas* gvidas plurajn atelierojn por infanoj kaj plenkreskuloj (sed ni ne ricevas informojn).

Kulturo kaj aranĝoj

La tradicia Esperanto-Festo kunvenigis en Foix, la 17an de decembro 2017, kvindek da esperantistoj el la regiono, por atelieroj, vizito, koncerto, spektado de filmoj, debato, foiro de asocioj, libroservo.

Pri aliaj aranĝoj kaj agadoj en Tuluzo, vidu la raportojn de EKC. Eurokka estis partnero de la *Tago pri Ekzilo* kadre de SEMEO en Marto.

En Arieĝo, okazis la tradicia korusa staĝo.

Raportas Marion Quenut

6. Jarraportoj de la fakaj asocioj

6.1. Espéranto-Jeunes (JEFO)

Esperantistaj junuloj daŭrigas siajn kutimajn agadojn (manĝojn, renkontiĝetojn en Parizo).

Ĉirkaŭ 10 membroj de JEFO ĉeestis ĉe JES.

Nun ni estas pretigantaj eventon kiu okazos jaŭde ĉe ENS (estas la propono C, kompreneble pri Esperanto).

<https://www.ens.fr/actualites/un-parlement-europeen-l-ens>

La poliglota renkontiĝo en Denfert Café nun okazas nur unu fojon monate.

Nia membraro ŝajne kreskas.

Ĉi-jaraj novuloj en ENS (kurso kiun ni kreis kaj estas farita de Jesper), estas tre motivitaj.

Ni babilis kun angloj dum JES kaj eble estos reprezentantoj de JEFO en Dovro.

Raportas Lucas Teyssier

6.2. Groupe des enseignants espérantophones (GEE)

6.3. Franca Katolika Esperanto-Asocio (FKEA)

Bedaŭrinde, ni ne ricevis agadraporton de FKEA.

6.4. Fédération espérantiste du travail (FET)

Ĉi-jare la agado de FET koncentriĝis ĉirkaŭ kontaktoj kun la franca pacmovado. FET estis inter la 160 asocioj (kun Espéranto-France) kiuj subskribis la alvokon al porpacaj manifestacioj ĉie en Francio la 22an de septembro, kadre de internacia tago de la paco. Ĝi ankaŭ aperis inter la subskribintoj de alvoko al manifestacio antaŭ 9 militbazoj tra Francio la 14an de oktobro, por postuli ke Francio ratifu la internacian traktaton pri malpermeso de nukleaj armiloj.

La listo de subskribintoj (videbla ĉe

<http://culturedelapaix.org/blogs/Rennes/2018/10/06/ils-vous-appellent-collectivement-au-succes-des-rassemblements-du-14-octobre/>) aperis ankaŭ sur flugfolioj disdonitaj, almenaŭ por la manifestacio apud Bresto la 14an de oktobro.

Fine, FET pretigis la esperantlingvan version de petskribo en 10 lingvoj, ekigita la 11an de novembro 2018 por antaŭenigi la pripacan kulturon

(<https://www.mvtpaix.org/wordpress/maudite-soit-la-guerre-construisons-la-paix/>).

Raportas Flora Markov